N-ro 0016, aperas dusemajne

# Eventoj

ESPERANTO

Redakcia adreso:
Budapest, pk. 87.
H-1675, Hungario
Telefono kaj telefakso:
(+36-1) 1288-258

Internacia Sendependa Revuo pri la Esperanto-Movado oktobro (2) - '92


Enkonduko al Retlando

## Retoj kunligas komputilojn

En evoluintaj landoj komputiloj troviĝas hodiaŭ preskaŭ ĉie, kie homoj laboras pri teknikaj aferoj.

Kelkaj el tiuj komputiloj estas memstaraj, kaj kelkaj estas kunligitaj en "loka areo" - retoj kun po inter 2 kaj 100 maŝinoj.

Ankaŭ multaj el tiuj malgrandaj retoj estas kunligitaj, formante grandajn, larĝ-areajn retojn.



Unu tia granda reto estas "INTERNET". Eble ĝi estas la plej populara el la mondvastaj komputilretoj. Jen informoj pri kelkaj - por esperantistoj interesaj - agadoj ebligitaj de INTERNET.

### Por kiuj?

Mi kredas, ke ĉiu studento ĉe eŭropa universitato rajtas havi senpagan "konton" ĉe loka komputilreto ligita al INTERNET. (La komputilestroj kutime estas indiferentaj ĉu oni studas aŭ ne komputilrilatan fakon.) Sed La Reto absolute ne estas limigita al tiuj: ekzemple en Norvegio pli ol 200 firmaoj kaj lernejoj havas retkonekton! (Listo haveblas, kompreneble retpoŝte, ĉe la aŭtoro.) Multaj el ili ofertas al ĉiuj siaj studentoj/dungitoj retaliron.

Ekzistas multaj retoj, INTERNET estas nur unu el ili, sed ĝi estas granda, kaj rapide kreskanta. Sed ŝajne ne multaj esperantistoj konas la eblecojn ofertatajn de tia konekto.

### Kiel utiligi la Reton?

La Reto ebligas komunikadon inter la komputiloj, kaj inter la uzantoj de la komputiloj. La interkomunikado postulas de la komunikantoj neniom teknikan scion pri komputiloj aŭ pri programado.

En la tuta mondo la nombro de la komputiloj rekte alligitaj al INTERNET, estas iom pli ol unu miliono. Ĉe pluraj centoj de tiuj komputiloj sidas ĉiutage esperantistoj.

Uzanto de komputilo tiel konektita, rajtas iam ajn konekti sin al forumoj diversspecaj kaj -temaj. Ne mirinde, diskutiĝas kelkloke la temo "esperanto". Unu el la tiel nomataj "novaĵgrupoj" distribuataj per INTERNET nomiĝas "soc.culture.esperanto" kaj disportas diskutojn pri esperanto-kulturo, parte en la angla, sed ankaŭ ofte per esperanto. Tie aperas pluraj artikoloj ĉiun tagon.

Miloj da komputiluzantoj, kiuj ne estas rekte konektitaj al INTERNET, povas tamen komunikiĝi kun iu ajn alia uzanto (aŭ eĉ novaĵgrupo), per koncepto konata kiel ***elektronika poŝto***, aŭ ***retpoŝto***.

Ĉiu retulo en la mondo havas unikan retadreson (kodon). Ekz. la adreso de la aŭtoro estas *"Ulf.LundeOkvatro.no"*. Se persono, kiu uzas retkonektitan komputilon ie en la mondo, entajpas mesaĝon adresitan al tiu adreso kaj sendas ĝin, mi ricevas ĝin post inter kvin sekundoj kaj kvin minutoj (iomete pli, se la letero estas tre longa kaj la sendanto ege for).

Iom post iom, ankaŭ esperantistoj ekuzas tiun utilegan retpoŝton.

### La reto atingas homojn en multaj landoj

Ekde la komenco de 1991 grupo da aktivuloj ofertas e-kurson por komencantoj per ĝi. La kurso, nomata SEK (Senpaga Esperanto-Kurso), havas dek lecionojn. Ĝi funkcias tiel:

Se eble, oni uzas la nacilingvon de la lernanto. La instruanto sendas retpoŝte lecionon al la lernanto. La lernanto tralegas ĝin laŭ sia preferata rapideco, kaj sendas demandojn al la instruisto pri iuj ajn neklaraĵoj. Kompreninte la lecionon, la lernanto respondas al ekzercoj, kaj sendas siajn respondojn al la instruisto por korektado. Tiu klarigas pri eventualaj eraroj kaj sendas al la lernanto la sekvantan lecionon.

La tuta kurso daŭras inter kelkaj tagoj kaj kelkaj jaroj, depende de la leterofteco.

Ekde la komenco en 1991 SEK havis 537 kursanojn el 31 landoj. Tio ne estas mirinde alta nombro: per retpoŝto aliĝo ja kostas eĉ ne unu poŝtmarkon, kaj tial multaj ekprenas la kurson sed ĉesas post kelkaj semajnoj, sen fini la dek lecionojn. (Tamen ankaŭ tiuj almenaŭ estas eksciintaj pri e-o.) Tiuj, kiuj finas ĉiujn lecionojn, ricevas diplomon (sed ili devas mem trovi laserpresilon por surpaperigi ĝin).

Hodiaŭ 147 homoj estas studantaj per SEK. Tiun nombron limigas malpli la nombro da potencialaj lernantoj ol la nombro da kapablaj instruantoj (korektantoj). 30 instruantoj el 11 landoj libervole korektadas la ekzercojn. Ĉiu lernanto interagas kun nur unu instruanto dum la tuta kurso.

La verkisto Claude Piron afable ofertis al la reto en elektronika formato la lernolibron "Gerda malaperis". Per ĝi ĵus komenciĝis nova reta e-kurso: la tiel nomata GERDA-kurso, ankaŭ tiu senpaga laŭ la sama sistemo kiel SEK. GERDA estas pli altnivela kaj do bona por finintoj de SEK.


Se vi konas ne-esperantistan studenton kun (dormanta) interesiĝo pri e-o, proponu volonte, ke li/ŝi perrete kontaktu min por informoj pri tiuj kursoj!

### Uzu la reton laŭplaĉe

Krom diskutforumoj kiel "soc.culture.esperanto" kaj rekta retpoŝto de homo al homo, ekzistas aliaj servoj en INTERNET. Ekz. haveblas (plejparte senpage) per la reto:

- vortaroj, ekz. komputila terminaro
- aro de e-aj librorecenzoj
- interesaj esperanto-tekstoj
- tekstoj e-aj/anglaj por plulernado
- la katalogo de la Libroservo de UEA
- Internacia Scienca Dokumentaro de la Akademio Internacia de Scienco (AIS)
- esperanto-literfontoj por komputiloj
- komputilprogramoj por e-istoj, ekz. por la komputilo "Amiga"
- listo de tiaj programoj

La Centra Oficejo de UEA en Rotterdam ankoraŭ ne alligiĝis, sed mi kredas, ke tio ne longe daŭros. Ni daŭre informadas ilin pri la utileco de la reto! Kiam ni povos atingi ilin perrete, ankaŭ ili certe ekofertos retajn servojn al Esperantujo.



### Rektaj konversacioj

Sed mi ankoraŭ ne rakontis pri la plej amuza uzo de la reto: interparolad-programoj!

Per nur kelkaj klavofrapoj oni povas eniri mondeton, kie esperantistoj interbabiladas pri ĉio ajn. Iom ajn da esperantistoj en iom ajn da landoj povas samtempe partopreni. Ĉio, kion unu el ili tajpas per sia komputilo, aperas sur la ekrano de ĉiuj aliaj (prefiksite de la nomo de la dirinto). Iom trejninte, oni kapablas babili tiamaniere preskaŭ samrapide kiel parole.

Ĉiun mardon (kaj ankaŭ ofte dum aliaj tagoj) grupo da esperantistoj kunvenas per siaj interkomunikad-programoj en virtuala loko (tiel nomata "kanalo") por babili. Dum la lastaj tri monatoj mi vidis 50 pli-malpli spertajn esperantistojn en tiu kanalo.

*daŭrigo sur la paĝo 6.*

## Organizaj demandoj

*En la antaŭa numero aperis artikolo kun la titolo: "UEA - ĉu ne kapabla?" Nun sekvas daŭrigo de tiuj pensoj, sed rilatantaj nur al la financa flanko. "Imagu bildon de UEA, kiu ĉiujare havus gajnon de dek milionoj da guldenoj..."*

# Financaj aferoj

Tiu artikolo precipe rilatas financon de UEA, sed iujn rimarkojn, proponojn kaj solvojn prezentitajn tie ĉi oni povas utiligi en aliaj institucioj ne nur esperantaj. En tiu artikolo mi prezentos nur iujn problemojn kaj iujn proponojn por solvo de ili; mi petas, ke vi reagu iel ajn, ĉar ies ajn kontribuo estas valora kaj povas esti profitiga. Tial ne hezitu reagi, skribu viajn rimarkojn kaj proponu solvojn.

Unue bonvolu analizi almenaŭ supraĵe financajn raportojn de UEA de pasintaj kelkaj jaroj. Sen konvinkado vi konstatos, ke buĝeto de UEA povas maltrankviligi tiujn, kiuj zorgas pri estonteco de la asocio. Ĝenerale konata malforteco de UEA malebligas al tiu asocio efike agi, realigi la movad-evoluigajn projektojn, kaj tio signifas malrapidan malprogreson. Savas la situacion donacoj, danke al tiuj UEA daŭre povas ekzisti kaj aserti, ke ĝia ĝenerala financa situacio estas ne malbona pro relative granda kapitalo, kiu eĉ kreskas. Mi respondas: se la kapitalo ne kreskus, estus malesperiga situacio, tamen tio, ke konstante mankas mono en la buĝeto, ankaŭ kaŭzas malprogreson.

### ... finance riĉa

Por kompreni la gravecon de tiu problemo, mi proponas al vi permesi vian imagon krei bildon de UEA, kiu ĉiujare havus gajnon de ekz. dek milionoj da guldenoj. Kion tiu organizaĵo povus fari por la movado? Ĉu ĝi daŭre estus institucio kun eta signifo por la ekstera mondo?

Krome mi volas prezenti al vi parton de mia bildo pri finance sana UEA; kion ĝi povus fari:

**- havi reprezentejojn (oficejojn)**

en multaj regionoj sur Tero, kiuj estus ligitaj per komputila moderna sistemo. Havi reprezentejon en diversaj regionoj, signifas havi realan eblon de samtempa kaj senpera agado (eduka, informa, eldona, financa...) tie;

**- havi pagatajn instruistojn**

tie, kie ili estas necesaj por starigo kaj evoluigo de la movado. Mia laboro kaj sperto en tiu fako pruvas, ke estas nekalkuleblaj kvantoj da homoj, precipe en la triamondaj landoj, kiuj volas lerni esperanton, sed ne povas, ĉar estas neniu, kiu povas instrui al ili;

**- regule reklami pri esperanto en internacie konataj gazetoj,**

tio iom ŝanĝus situacion, en kiu pli granda parto de teranoj nenion scias pri la internacia lingvo; ja se homoj aŭdas pri io ne ofte aŭ tute ne, kiel oni postulu, ke la mondo pensu pri tio, eĉ se tio estas grava monda problemo.

**- subvencii radiajn kaj televidajn esperanto-kursojn,**

kiuj nun nur malofte, malregule kaj en malmultegaj lokoj okazas, dum aliajn lingvojn oni povas ĉiam lerni tiel;

**- eldoni lernolibrojn kaj vortarojn**

por solvi tiun malforton de la movado, kiu pleje bremsas ĝian evoluon; neniu serioza sciencisto, komercisto lernos la internacian lingvon, se li eĉ lernolibron de esperanto ne povas trovi en sia nacia lingvo. Se esperantaj lernolibroj estus aĉeteblaj en ĉiuj librovendejoj, ni plendus pro tro granda kvanto de esperantistoj en la mondo;

**- havi internacian radion,**

kiu dissendadus en esperanto dum tuta tempo; tiam oni povus fieri, ke la internacia lingvo eĉ en radio estas uzata kaj utila pro siaj freŝaj novaĵoj kaj edukaj programoj;

**- havi lernejojn**

en triamondaj landoj, kie pluraj internaciaj organizaĵoj per edukado de infanoj kreas civitanojn de pli bona mondo; esperantaj lernejoj certe povus bone komprenigi al la lernantoj ideojn de internaciismo;

**- havi pli belan, enhave riĉan, pli ofte aperantan gazeton,**

nuna maldika, ne regule aperanta kaj multekosta "Esperanto" estas legata de kelkaj miloj da esperantistoj - kiom da influo tio kreas en la tuta mondo?

- ktp. oni povus listigi, kion kaj kiom UEA povus fari por la movado, se ĝi havus monon, kiun ĝi certe meritas, kaj pro tio ke ĝin ne havas, plenumas rolon de preskaŭ nur prestiĝa nomo.

### Kio ja mankas?

Ĉiu homo, kiu pli serioze pensas (kaj poste agas) pri bonigo de sia financa situacio, scias, ke gajni multan monon estas malpli malfacile ol oni ĝenerale supozas. Estas ĝenerala regulo, kiu diras, se oni volas, oni povas - ĝi estas tute aplikebla al mongajno.

Ni devas klare konfesi, ke en UEA neniam laboris plenatempe kaj plenaenergie homo, kies laboro konsistus el mongajno por la asocio. Oni neniam vere serioze pensis pri mono por UEA, ĉar ja la asocio estas ne nia persona afero. Kvankam UEA havas multajn eblojn bone enspezi, oni ne utiligas ilin, oni eĉ ne provas utiligi ilin. Se UEA havus almenaŭ unu bone pagatan dungiton, kies celo estus riĉigi la asocion, ĝi certe estus sen deficitoj kaj eĉ kun granda plusa saldo.

Mi preferas esti konkreta, proponi konkretajn solvojn. Sidi en kunveno, kie oni kritikas, interŝanĝas informojn, diskutas kaj faras rezoluciojn, ne multe helpas. Mi ofte proponas al diskutantoj konkretajn proponojn, kaj ĉar la partoprenantoj ne kutimas tiel kondutí, ili ne konsideras ilin.

## La konkretaj proponoj

Nun mi volas proponi kelkajn simplajn manierojn plibonigi financan situacion de UEA, kaj mi supozas, ke neniu en la estraro aŭ komitato konsideros ilin, kaj oni daŭre altigos ĉiujn eblajn kotizojn, anstataŭ forigi la financan mallaboremon.

1. UEA ŝanĝu sian financan statuon al mone profitanta asocio, se alie ne eblus realigi mone profitigajn projektojn.
2. UEA investu, en evoluigon de profitigaj entreprenoj, pli grandan parton de mono tenata en bankoj. Komercaj, turismaj, reklamaj kaj aliaj agadoj estas necesaj.
3. UEA dungu fakulojn pri profitigaj entreprenoj, kiuj ricevu monon laŭ sia laborinvesto kaj rezultoj. Ju pli multan monon UEA gajnas el iu entrepreno, des pli multe gajnas respondeculo de tiu entrepreno. Tio estas facile realigebla.
4. UEA dungu homon aŭ eduku iun volontulon, kiu okupos sin nur pri akcioj, obligacioj, borsaj investoj kaj similaĵoj. Estas preskaŭ senriskaj investoj, kiuj bone profitigas. Oni unue devas lerni en ĝustaj kursoj. Miloj da homoj kaj institucioj profitas multege el tio, sed unue ili investis en la lernadon.
5. UEA justigu sian kotizan sistemon laŭ riĉeco de esperantistoj. En riĉaj landoj la kotizoj estas ridinde malaltaj, en malriĉaj ili estas altegaj.
6. UEA ellaboru sistemon de servoj pagendaj, kaj uzu la delegitan reton por ĝia efika realigado, tiel ankaŭ la delegitoj gajnos monon.
7. UEA vendu sian plej gravan varon - esperanton - en formo de informoj, informiloj, servoj kaj libroj. Ekz. vendo de informiloj pri solvoj de homaj deziroj (vojaĝi, havi multajn eksterlandajn amikojn k.a.) per uzo de esperanto, povas doni bonan profiton por informanto kaj informato.

Mi ripetas: se daŭre neniu profunde kaj serioze pensos kaj agos pri mono en UEA, la asocio havos preskaŭ neniun ŝancon je rimarkinda evoluo, kaj daŭre estos ne kapabla evoluigi la movadon en la mondo.

Mi scias, ke proponi estas facile kaj realigi ne, sed samtempe mi estas certa, ke se mi respondecus pri financoj de UEA kaj rajtus mem decidi, mi dum kelkaj jaroj renovigus la asocion, fortigus ĝin kaj direktus al ĝusta agado, ne al nura ekzistado.

Bonvolu reagi. Proponu konkretajn solvojn. Montru mankojn de internaciaj organizaĵoj kaj de UEA, kaj montru manierojn forigi, antaŭmalhelpi ilin. Ne hezitu skribi, paroli kaj agi pri mono per kaj por esperanto. Esperanto estas ĉiam moderna, sed la movado uzas malnovajn, ne efikajn metodojn; ĉu tio nepre devas esti tiel?

*Joachim Werdin*
*pk. 147, PL 47-220 Kedzierzyn, Polio*

## *Esperanto aplikata*

# Konkurso "Esperanto" por radioamatoroj!

21-22. en novembro

Internacia Ligo de Esperantistaj Radioamatoroj ĉiujare organizas konkurson por radioamatoroj, nomata "Konkurso Esperanto". La konkurson povas partopreni iu ajn radioamatoro, la sola kondiĉo estas, ke la uzata lingvo - almenaŭ por la konkursa (raport)numero estu en la Internacia lingvo. (La dumkonkursaj kontaktoj estas tre mallongaj, krom la voksignoj oni interŝanĝas nur la ricevokvalitan raporton (RS) kaj vicnumeron de la kontakto).




La reguloj estas simplaj:

1. Estas uzeblaj ĉiuj amatoraj bendoj kaj ĉiu tipo de modulado.
2. Ĉiu kontakto valoras 1 poenton. La kalkulo okazas po bendoj.
3. Kontrolciferoj: la kvalito-raporto (RS) + sinsekva vicnumero (59001, 59002 ktp.)
4. Daŭro de la konkurso: De 21a de novembro, 00.00 UT ĝis 22a de novembro 24.00 UT.
5. Estas devige minimume 20 plenaj horoj de ripoza paŭzo (minutoj 00-59)
6. Kun la protokolo estas kunsendendaj la sekvaj datumoj: voksigno, nomo, adreso, kalkuloj de kontaktoj / stacioj diversaj/ landoj laŭ DXCC (radioamatora landolisto) / eventualaj komentoj.
7. Protokolon (taglibro-kopion) sendu ĝis 30a de novembro al:

*DJ4PG, Hans Welling, Bahnhofstr. 22, DW-3201 Hoheneggelsen,*

# La unua ĝenerala kunsido de ENA

ENA - E-Naturkuracista Asocio prezentis sin en la viena UK. Kunsidis 155 membroj kaj interesuloj. La aranĝon gvidis D-ro Puramo Chong el Korea Respubliko kaj S-ro Hubert Schweizer, naturkuracisto el Germanio.

ENA estis fondita en 1986 kaj nombras nun 85 individuajn membrojn el 35 landoj. La asocio celas interligi fakulojn kaj interesulojn pri naturkuracado, kio inkludas plurdekon da diversaj alternativaj kaj tradiciaj kuracmetodoj. Dum la kunveno apartan atenton oni dediĉis al la revuo *"Naturkuracado"*, aperanta trifoje jare.


Esperantista Naturkuracista Asocio (la 20-a de Aŭg.1992)

**Membro-Bulteno (N-ro2)**

Skribanto : Puramo CHONG, Ĝenerala Sekretario de E.N.A.
Adreso: Kwangmyongshi, Kwangmyong 2 dong 50-5, Kyongkido, Koreio
Tel: 82 2 687-8413, 82 2 686-7923. Fakso :82 2 616-1571
*(Se vi skribas al sekretario, aŭ sendas artikolojn, adresu al supra adreso)*

En Viena UK la estraro de UEA oficiale pritraktis la kontrakton subsignitan en februaro 1992 inter UEA kaj ENA pri kunlaboranta rilato, kaj ili formale agnoskis la kontrakton. Do ekde la venontjara UK en Valencio ENA havos plenan rajton senpage uzi kongresan fakkunsidejon, kaj en la UEA-jarlibro oni listigos nian asocian nomon. ENA aperigos sian unuan Jarlibron verŝajne en decembro de tiu ĉi jaro kune kun nia organo, *Naturkuracado*. Ni atendas viajn manuskriptojn bonkvalitajn, originalajn aŭ tradukitajn. Se vi skribas al sekretario, aŭ sendas artikolojn, vian sendaĵon adresu al:

*Puramo CHONG,*
*Ĝen. Sekr. de ENA, Kwangmyongshi, Kwangmyong 2 dong 50-5, Kyongkido, Koreio.*
*Tel.: +82-2-687-8413;*
*fakso: +82-2-616-1571.*
*Laŭ Membro-Bulteno de ENA, N-ro 2.*



# Akcia Kompanio "Krasnojarsk-Esperantotur-Sputnik"

Antaŭnelonge en Krasnojarsk estis fondita turismo-komerca Akcia Kompanio "Krasnojarsk-Esperantotur-Sputnik" (KETS).

Celo de la kompanio estas atingi komercajn interesojn per esperanto kaj tiamaniere disvastigi esperanton en la monda merkato, agante por esperanto. La branĉoj de ĝia agado:

» Organizo de internacia turisma interŝanĝo;
» Eldonado de esp-a literaturo kaj periodaĵoj;
» Produktado kaj surmerkatigo de varoj kaj servoj;
» Perado de kunlaborkontaktoj inter rusiaj kaj alilandaj firmaoj;
» Organizado de internaciaj aranĝoj;
» Kunlaboro surkampe de e-kulturo.

Pli detalaj informoj:

*pk. 24536, RUS-660100 Krasnojarsk, Rusio,*
*Telefono: +7-3912-235259;*
*Fakso: 7-3912-239683.*
*Laŭ Amikaj Adresoj el Siberio/6.*

# E-traduka servo serĉas kunlaborantojn

La Esperanto-Traduka Servo de Yangzhou, apartenanta al la Yangzhoua Scienc-Teknika Komisiono, estas entrepreno kun jura personeco fondita en 1989. En la pasintaj tri jaroj la servo aktive disvolvis internacian interŝanĝon kaj akiris bonan socian efikon. La Servo pretas kunlabori kun eksterlandaj individuaj esperantistoj kaj e-organizoj en disvolvo de ekonomio, komerco, turismo, scienco, ktp. Kontaktadreso:

*Esperanto-Traduka Servo de Yangzhou, n-ro 17, Dahongqiaolu, Yangzhou, 225002 Jiangsu, Ĉinio.*

# Kungfu-uloj atenton!

Klubo de orientaj batalartoj "cjuanj-ŝu", kiu bazas sin je tekniko de ŝao-linj-stilo de kung-fu *"FLAVA DRAKO"*, serĉas kontaktojn kun parencaj organizaĵoj (kluboj) el la tuta mondo por interŝanĝo de informoj.

Kontaktadreso:

*Gonĉarov Vladimir, pr. Pobedi, 52 "B", kv.45, UKR-310202 Harkov-202, Ukrainio.*



## *Komerca aplikado*

# Kontakto serĉata!

*Mi laboras en iu privata firmao, produktanta radioteknikaĵojn. La firmao estas malgranda, do resti viva en nuna ekonomika situacio ne estas simple. Nun mi serĉas kontaktojn al iu eksterlanda kompanio por kunlaborado. Mi intencas organizi komunan (internacian) entreprenon kun iu negranda firmao, kiel mia de eksterlando. La produktojn de tiu entrepreno oni povus transporti eksterlanden senimposte.*

*Ni produktas aparatojn ĉefe por kabla televidado: transkodilojn PAL-SEKAM kaj modulatorojn. Verŝajne tio ne tre interesas konsumantojn en okcidento. Sed krom tio ni produktas detektilojn por kontroli valutojn, kiuj havas magnetan protekton. Dimensioj - kiel skatolo de cigaredoj. Eblas kontroli dolarojn, markojn, pundojn ktp. Proksimuma prezo: 5-7 USD.*

*Nun ni prilaboras sendilon - aparaton, kiu permesas trarigardi filmon de videomagnetofono en apuda ĉambro sen kablo!*

*Niajn produktojn ni intencas interŝanĝi ĉefe por radioteknikaj komponeroj: mikroskemoj, transistoroj ktp.*


*Bonvolu kontakti:*

*Georgo Golubev, ul. Saksaganskij 44, ap. 39/1, UKR-252033 Kiev-33, Ukrainio.*

## Aranĝoj

# Inter Eŭropo kaj Azio

Post la sukcesa Eŭropo-Azio'91 (pli ol 100 partoprenintoj el pluraj landoj) Ruslanda Esperanto-Asocio, REA invitas Vin al la renkontiĝo Eŭropo-Azio'92. Ĝi okazos en urbo Jekaterinburg (antaŭe Sverdlovsk) inter la 29-a de decembro '92 kaj 5-a de januaro '93, nur 30 km-ojn for de la limo inter Eŭropo kaj Azio.




En la programo: Festa renkonto de la nova jaro 1993, teatraj kaj kanzonaj prezentoj, rusa folklora vespero, ekskursoj al la limo inter Eŭropo kaj Azio, aliaj uralaj vidindaĵoj, kaj seminario "Esperanto en la postkomunisma mondo".

Partoprenkotizo ĉ. 200 DEM, por ekssoclandoj speciala rabato: nur egalvaloro de 30 USD (pagebla ankaŭ al LINGVO-Studio).

Por la dezirantoj estos organizita trajna vojaĝo kun vizito de Moskvo kaj Volgo.

Pliaj informoj ĉe REA:

*RUS-620077 Jekaterinburg-77, pk. 67, Rusio. Telefakso: +7-3432-514707 ATT MARAT.*

## Pedagogia renkontiĝo, kaj seminario

14-18. novembro, Prago - Paderborn

Pedagogia fakultato de Karla Universitato Prago, Instituto pri Kibernetiko Paderborn kaj Eŭropa Klubo Paderborn planas renkontiĝon de pedagogoj interesiĝantaj pri lingvoorientiga instruado. Anticipan intereson por internacia projekto montris pedagogoj el *Bulgario, Italio, Ĉeĥio, Hungario, Germanio* kaj kelkaj aliaj. La 14-an kaj 15-an de novembro 1992 ni renkontiĝos en Karla Universitato Prago por detale plani la lingvoinstruadon de la Internacia Lingvo de D-ro Esperanto kiel propedeŭtiko por posta instruado de fremdaj lingvoj. Ni serĉas instruistojn kaj lernejojn, emantaj kunlabori.

Post la dimanĉa urborigardado en Prago la 15-an de novembro oni veturos al Paderborn, kie okazos plua pridiskutado de la programo de lingvoorientiga instruado kaj amika kunesto de la membroj de Eŭropa Klubo (la 17-an kaj 18-an de novembro). En Prago eblos malmultekoste tranokti en studenthejmo. Interesiĝantoj skribu al: Inĝ. Fialová, Pedagogia Fakultato, Rettigové 4, 110 00 Prago, aŭ al *Instituto pri Kibernetiko/Eŭropa Klubo, Kleinenberger Weg 16, DW-4790 Paderborn, Germanio.*



*Ĉu oni skribas tion kun 1 aŭ kun 2 birdoj? (el Monato 10/92)*

## Internacia E-Renkontiĝo en Estonio

inter la 2a kaj 4a de julio 1993.

**Temaro** de la renkontiĝo:

1. Historio de la movado;
2. Problemoj de regiona agado por aktivigi la movadon;
3. Estonio - la ŝtato kaj ĝiaj perspektivoj;
4. Ekskursoj.

**Celo** de la renkontiĝo: laŭeble vasta aktivado kaj parolpraktiko, aktiva feriado.

**Partoprenkotizo** 10 USD + restadkostoj 3-7 USD/tago. Pliaj informoj ĉe Estona Esperanto Asocio aŭ ĉe:

*Jaan Ojalo, Narva mnt. 9-5, EE-0001 Tallin, Estonio.*

## E-somerkurso en Aŭstralio

Inter la 11-a kaj 22-a de januaro 1993 denove okazos en Adelajdo Aŭstralia Esperanto-Somerkursaro. Petu informojn ĉe:

*Max Wearing, 30 Westbury Street, Hackney SA 5069, Aŭstralio.*

# I.J.K. impresis min

Mi estis juna kiam mi aŭdis pri esperanto kaj poste en mezgrada lernejo mi decidis lerni tiun lingvon. Post la kurso en nia klubejo, ni kunvenadis ĉiusemajne por praktiki esperanton. Ankaŭ mi korespondis kun amikino el apuda lando - Hungario. Post ŝia vizito ĉe mi en Varaĵdin, en Kroatio, la vojaĝo al ŝi estis mia unua sen gepatroj.

En 1970 la Internacia Junulara Kongreso (I.J.K.) okazis en Graz, en Aŭstrio. Tiu najbara lando estis facile atingebla kaj mi decidis partopreni I.J.K.-on. Mi ne multe sciis pri kongresoj, sed en nia klubejo foje mi aŭdis sopire rakonti pri ili de kelkaj spertaj esperantistoj. Ili priskribis ilin kiel unikajn okazaĵojn.

Kaj jen, mi atingis Graz, la trajnan stacidomon. Tuj mi rimarkis E-informejon kaj bone mi komprenis la klarigojn, kiel atingi la kongresejon. Mi ne plu estis sola, ĉar per sama trajno venis kelkaj aliaj gejunuloj, kiuj portis verdan steleton, aŭ verdan flageton, aŭ sakon kun iu E-skribaĵo.

Marŝante kaj interparolante mi ne rimarkis kiom for estis la kongresejo.

Tamen la akceptejon kaj etoson de la kongreso mi neniam forgesos.

Mi ricevis informojn pri kongreso kaj la numeron de mia dormoĉambro kaj kiam mi eniris ĝin, jam aliaj du junulinoj salutis min. Unu estis italino kaj alia japanino. Min impresis Susumiko ĉar por mi tio estis la unua interparolo kun persono de azia kontinento.

En nia ĉambron alvenis ankaŭ la kvara esperantistino. Ŝi estis el Francio, kaj ni kvar ekbabilis kaj ekridis kvazaŭ de longe ni konis unu la alian. Renée kaj Gina konis sin de antaŭaj kongresoj kaj ili iom klarigis al mi pri programeroj.

La saman vesperon okazis la tiel nomata interkona vespero kaj por pli bone koni aliajn 200 partoprenantojn el ĉirkaŭ 30 landoj, organizantoj elpensis interkonatiĝan ludon.



Bonŝance, ĉar kiel novulo, mi estis tiom impresita de nomoj kaj landoj kaj amika etoso, ke mi restis nur sidi ĉe unu tablo kaj observis per grandaj okuloj kaj oreloj. Des pli agrable estis kiam venadis al mia tablo simpatiaj gejunuloj kaj alparoladis min. Foje mi ne ĉion komprenis kaj ekfoliumis la vortaron kaj ili pacience sidis, atendis dum mi ne trovis la signifon kaj diris, jes, tion mi diris, ĉu vi komprenas nun?

Poste aŭdiĝis grupo de katalunoj kiuj kantis siajn kantojn tradukitajn en esperanto. Iu franco gitarludis kaj kelkaj aliaj ekkantis.

Susumiko montris al mi *origami*-on, paperfaldadon, iom komplika por kompreni ŝiajn rapidajn movojn, kaj jen la besto, jen la floro aŭ korbeto.

Alian tagon, solena malfermo de I.J.K. Ĉiu landa reprezentanto volis saluti kongreson kaj diri ion pri sia lando.

Antaŭ ol mi venis al kongreso, la nomo internacia kongreso signifis aŭskultilojn, samtempajn tradukantojn...

Sed, tiu E-kongreso estis sen tiu lingva baro. Pro tio ŝajnis al mi tuj, ke mi estas inter geamikoj, inter homoj kiuj bone komprenas min. Mi kvazaŭ pruvis al mi mem, ke indis lerni esperanton, ĉar per unu lingvo mi vere povas kompreni diverslandajn eŭropanojn, azianojn kaj eĉ unu el Afriko ĉeestis.

Ekskursa tago, nacia vespero, lingvo kurso, diskutrondoj, estis aliaj programeroj. Tamen tiutempe mi pleje ŝatis neorganizitajn, spontanecajn grupetojn kiuj kantis, interparolis, ridis sub iu arbo en la korto de la kolegio.

Maska dancvespero, internacia kaj adiaŭa vespero restis memorindaj.

Certe mi neniam forgesos tiun amikecan energion, ĉu nomi ĝin esperanta, Zamenhofa, verda - tute ne gravas la nomo. Gravas ke mi fine de tiu kongreso decidis ekmovadi, informi pri e-o, batali por celoj kiujn havis Zamenhof. Mi volis, ke ĉiu lernu e-on por eksenti similan amikan, fratecan etoson de I.J.K.

*Zdravka Metz,*
*laŭ La Riverego No 27*

## Propagando

# KION FARI
## por informi la gazetaron?

*Tre ofte pri la silento de la gazetaro rilate al esperanto kulpas la esperantistoj mem, kiuj ne, aŭ malbone informas. Ekzistaj bazaj reguloj, kiujn oni nepre devas atenti kaj plenumi...*

### *Al kiaj ĵurnaloj sendi informojn?*

Laŭ enhavo de la informoj ni povas turni nin al:
- ĝeneralaj gazetoj landaj, regionaj aŭ lokaj, laŭ la graveco de niaj novaĵoj;
- senpagaj anoncgazetoj, nur por regionaj/lokaj informoj;
- fakgazetoj por samfakaj informoj.
- Krome, niaj informoj kongruu kun la politikaj, filozofiaj ideoj de la celita gazeto.

### *Kiam ni informu?*

- *ANTAŬ* la okazaĵo (kongreso, seminario, prelego, malfermo de novaj kursoj, k.s.). Ĉe amaskomunikiloj (radio, TV, taggazetoj) ni sendu la informojn ĉ. 5-10 tagojn antaŭ la evento. Ni invitu ĵurnalistojn nur SE ni antaŭvidas sufiĉe da ĉeestontoj; estus ridinde venigi ĵurnaliston por kelkaj homoj.

- *TUJ* post la evento (laŭeble kaj prefere per telefakso).

### *Kiel ni informu?*

1. Nepras konscii, ke gazeto estas komerca entrepreno, kiu ne estas je la servo de la e-movado kaj kies spaco estas limigita; sekve ni skribu koncize pri interesaj novaĵoj.
2. Proponita artikolo estu tuj ekspluatebla, sekve tre gravas la aspekto, klareco, konstruo, stilo, gramatika kaj ortografia korekteco.
3. La teksto estu tajpita tre klare:
   - kun larĝa marĝeno maldekstre (ĉ. 20 literspacoj),
   - kun duobla interlinio,
   - sur unu flanko de la paperfolio,
   - kun tre alloga titolo.
4. Ni verku ne por e-grupo, nek por ni mem, sed por ekstera publiko, kiu ne speciale interesiĝas pri esperanto, tial nepras mencii la plej gravajn faktojn en la tuta alineo, kiu estu kiel resumo de la artikolo kaj kiu veku intereson por plilegi. *(Dum la verkado de la artikolo ĉiam havu antaŭ la okuloj la "averaĝan leganton" de la koncerna gazeto.)*
5. Ju pli mallonga estas la komuniko, des pli grandaj estas la ŝancoj de publikigo. Por ne forgesi gravajn informojn, ni skribu laŭ la regulo de la 6 K:

   *KIO? KIO? KIE? KIAM? KIAL? KIOM?*
6. Informoj estu precizaj. Ekzemple, ni ne skribu "antaŭnelonge" aŭ "pasintan semajnon", sed *"la 18-an de marto"*.
7. Informado ne estas propagando. Tamen krom la koverto, ankaŭ sur nia sendaĵo nepre ni menciu:
   - supre: la daton , la nomon kaj adreson de la sendanta grupo;
   - sube: adreson kaj telefonnumeron por pliaj informoj.
8. Nepre estas evitendaj: longaj frazoj, fakĵargono, senutila babilado, atakoj kontraŭ personoj, asocioj aŭ aliaj lingvoj.
9. Ni respektu la veron, ĉar ĉiu rajtas kontroli niajn diraĵojn. Ekzemple, ni ne parolu pri 4000 UEA-delegitoj, kiam nur ĉ. 2000 troviĝas en la jarlibro. Same ni ne uzu falsajn argumentojn, ekzemple dirante, ke e-o estas facila lingvo; tio ne veras, eĉ se ĝi estas dekoble pli facila ol la angla.
10. Laŭeble ni aldonu foton! Ĝi estu brila, nigra-blanka, kun mallonga teksto por klarigi ĝin; krome ni klare menciu, ke temas pri sola ekzemplero kaj ke ĝi estas senkopirajta. Sur la dorsflanko de la foto nepre skribu la titolon de la artikolo aŭ la nomon de la sendinto.
11. Akompana letero al la ĉefredaktisto aŭ al ĵurnalisto. Petu la publikigadon kaj indiku eventuale la rubrikon, en kiu la artikolo aperu.
12. Se la letero estas publikigita, *NEPRE* ni danku! Temas pri elementa edukiteco kaj estas okazo por plifirmigi kontaktojn.

**Atentu!**

Tiuj konsiloj ne estas magia recepto. Daŭre ni informiĝu ĉe spertuloj kaj laŭeble ĉe ĵurnalisto de la celita gazeto.

*Germain PIRLOT, Oostende, Belgio*

## Movado

# Junulara E-organizo en Usono

Ni volas krei junularan e-organizon por usonaj esperantistoj. Ni bezonas ideojn kaj konsilojn de alilandaj esperantistoj. Ni volas utiligi viajn jamajn spertojn por eviti superfluajn erarojn. Viajn leterojn atendas:

*USEJO, p/a Jozefo Truong,*
*624 Second Street, Lancaster,*
*PA 17603-5114, USA.*

### *Kiel oni agadas en Sud-Ameriko?*

En oktobro '92 en Saenz Penjo okazis la 2-a Interlanda Konferenco pri Instruado. Temas pri unika okazo ne nur por kleriĝo pri ludaj instrumetodoj, sed ankaŭ por interŝanĝo de spertoj inter du landoj - Argentino kaj Brazilo -, kiuj havas tradiciajn movadojn.

Aparte riĉaj povas esti la interkonsiladoj tie, ĉar tiuj du landoj ne parolas saman lingvon, kvankam lingvojn tute parencajn: la hispanan kaj la portugalan. Krome, la aranĝo prezentas unikan kadron por plej diversaj projektoj kaj eksperimentoj: invito de instruistoj de unu lando en la alian, aparte kiam temas pri rektmetoda instruado, aŭ dumferiaj interŝanĝoj de lernogrupoj gastantaj ĉe esperantistoj.

Nu, kio nova en tio? Por Eŭropo tio ne estas revolucia eltrovo, sed oni konsideru, ke tra tuta Ameriko oni ne spertas tiom la lingvan problemon kiom en Eŭropo. Tuta Latinameriko jam parolas siajn du internaciajn lingvojn, kies diferencetojn oni sufiĉe sukcese flikas per iaspeca piĝino, "portunol" (portunjol'), mikso de hispana kaj portugala. Kaj la situacio ne estas alia en Norda Ameriko, kiel ni ĉiuj scias.

La nova iniciato de Argentino kaj Brazilo gravas do, ĉar jen estas du landoj samregionaj kun ne tute sama lingvo, inter kiuj sekve praviĝas la lernado de esperanto laŭ ties tradicia argumento. Tamen la Interlanda Konferenco pri Instruado estas trafa okazo ankaŭ por eltrovi verajn motivojn, kiujn oferti al lernantoj en kontinento kie la hegemonio de ĉeflingvoj estas tiel forta.

*el Fenikso, 8/1992.*

# *Liberaj demokratoj kaj Genealogia Societo*

Silezia Esperanto-Asocio strikte kunlaboras kun la politika partio "Movado de Liberaj Demokratoj" kaj kun Silezia Genealogia Societo, kiuj en sia statuta agado uzas la internacian lingvon. La tri organizaĵoj kune luas triĉambran ejon (100 m2) por oficejo, kursejo kaj klubejo.

Esperantistoj kaj simpatiantoj de la internacia lingvo el la tuta mondo, sendepende de ŝtataneco kaj aĝo povas membriĝi al Silezia Eo-Asocio. Petu liston de perantoj en diversaj landoj.

*Silezia Esperanto-Asocio,*
*P.O.Kesto 16, ul. Dubois 3,*
*PL 50-952 Wroclaw 17, Pollando.*




RILATE INFORMADON NIAJ MOVADANOJ AGAS PRAEPOKE

# Freinet-movado

Aperis interesa dosiero pri esperanto - temas pri kolektiva laboro - en la suplementa numero de *Le Nouvel Educateur* kun la titolo *Le droit à la communication par l'espéranto* (La rajto je komunikado per esperanto).

La bele presita libreto, kolorbilde kovrita, prezentas la historion de esperanto en la Freinet-movado. Ĝi haveblas kontraŭ 10 FF (inkl. la sendokoston) ĉe:

*ICEM-ESPERANTO, Henri Menard,*
*F-44330 Le Pallet, Francio.*
*el Internacia Pedagogia Revuo, 1/92.*

# Internacia enketado inter lernejanoj

La esperantisto Elizabeta Vilisics Formaggio, instruistino en Italio, proponis antaŭ tri jaroj larĝan internacian enketadon inter lernejanoj por mezuri ilian deziron pri rekta kontakto kun alinacianoj, ilian sintenon pri la efektiva sukceso lerni malfacilajn fremdajn lingvojn kaj ilian opinion pri la plej taŭga internacia lingvo.

Partoprenis la enketadon pli ol 2000 junuloj, ĉefe inter 15- kaj 18-jaraj, el ses landoj: Italio, Katalunio, Hungario, Francio, Ukrainio kaj Germanio.

La rezultoj estis diversaj. Certe plej grave estas, ke la internacia lingvo prezentiĝis al multaj junuloj.

El "scienca" vidpunkto la enketado fakte ne donas fidindajn rezultojn. En ilia kompilado oni fakte entute ne uzis elementajn statistikajn teknikojn por certiĝi pri la universaleco de la rezultoj: ekz. 80% de la enketitaj katalunoj estis katalun-lingvaj, kio evidente ne respegulas la landan averaĝon; same pri Ukrainio, kie la enketo fariĝis en unusola gimnazio en la ĉefurbo kaj kie 80% de la enketitoj estis ruslingvaj! Finfine ja estas malfacile eltiri mezumojn el 32% da italoj, 27% da katalunoj, 23% da hungaroj ktp, sed ekz. nenie uzatas standardaj devioj k.s. La ĉefa scienca interesaĵo estas fakte, la malkovro de kelkaj sufiĉe unuecaj trajtoj tra ĉiuj landoj pri la interesiĝo al senpera facila komunikado de junuloj kun translimuloj, kaj ilia bonega akcepto de planlingvo tiucele. La enketo, bedaŭrinde, ne analizis, kiaj homoj pleje interesiĝis, kio ekstreme gravas por profesiemaj varbantoj.



Raporto prezentiĝis en la pasinta printempa sesio de Akademio Internacia de Sciencoj San Marino en Prago, kie ĝi havis sukceson. Resumo aperos ankaŭ ĉe Internacia Pedagogia Revuo. Interesitoj petu ĉe Kataluna Esperanto-Asocio la raporton kontraŭ 200 pesetoj:

*Pk. 290, 08200 Sabadell, Katalunio.*
*Kataluna Esperantisto, majo/jun./jul. 1992.*

# Ago-Tago ankaŭ en Londono!

Hodiaŭ, en la internacia Esperanto-Tago, malgranda nombro da esperantistoj manifestaciis vid-al-vide al BBC (la nacia brita radio- kaj TV-centralo) en Londono, je la 15-a horo, malgraŭ la malagrabla vetero. La e-istoj disdonis flugfoliojn al la publiko. Bonŝance, samtempe okazis ekspozicio de BBC, allogante multajn homojn al la loko. La manifestantoj portis nombron da grandaj kaj malgrandaj flagoj kaj afiŝbastonetoj. Je la 15:30 delegacio de la manifestantoj, tri gekomitatanoj de la Londona E-Klubo, enmanigis petleteron, subskribitan de 135 personoj, al la deĵoranta administranto de BBC kaj konversaciis kun li dum kelkaj minutoj pri esperanto. Ankaŭ la policinspektoro interesiĝe interparolis kun Johano Spencer pri esperanto kaj petis informilojn.

Poste la manifestantoj marŝis portante la flagojn al Oxford Circus kaj disiris tie.

Laŭdire oni planis stratmanifestaciojn kaj stratenketojn en Bristol, Carlisle, Colchester, Huddersfield kaj aliaj lokoj; krome ekspozicioj en aliaj lokoj. Kompreneble, mi ne scias, kio vere okazis hodiaŭ ekster Londono.

Ne forgesu, ke la naŭa de oktobro 1993 estos la venonta Esperanto-Tago.

*Johano Spencer, London*

Estus bone havi minimume unu foton pri la evento. Krome, pro veteraj kaj aliaj taktikaj motivoj eble oni devus interkonsenti pri pli frua dato de la internacia ago-tago. Se ĝi okazus 2-3 semajnojn pli frue, ĝi povus porti pli da efiko. La red.

# Retoj kunligas la komputilojn!

daŭrigo de la una paĝo

Por homoj, kiuj konas la lingvon, sed ne estas spertaj pri uzo de ĝi, tia babilado estas tre bona pro pluraj kialoj: ili ekhavas senton pri la "esperanteco" (aŭ manko de tio) de frazoj; ili lernas multajn novajn vortojn kaj kutime uzatajn idiotismojn; ili vigliĝas, vidante, ke la lingvo fakte uzeblas; kaj ili renkontas kaj ekkonas esperantistojn el multaj landoj, eble vizitotajn dum venontaj vojaĝoj.

Tia reta babilado ankaŭ solvetas la malnovan problemon pri manko da okazoj por uzi e-on "interreage" (kaj ne nur koresponde), kaj inspiras al la kursanoj de SEK kaj GERDA plulerni. Ĝi ankaŭ ebligas eĉ pli rektan komunikadon inter la instruantoj kaj la lernantoj ol retpoŝton.

Bedaŭrinde, rekta retkonekto estas ankoraŭ tro multekosta por privatpersonoj. Sed al tiuj el vi, kiuj studas en universitato aŭ altlernejo, aŭ laboras por teknika firmao, mi povas nur rekomendi, ke ili klopodu ekhavi retaliron. Iru surlokan komputilarejon kaj demandu pri ĝi! Sufiĉas ekhavi konton kun pasvorto, kaj tiam... Ek al Retlando!

*Ulf.LundeOkvatro*
*El Norvega Esperantisto, N-ro 4/1992.*




el Debrecena Bulteno

## Afrika agado

# Ĉu amikeco dependas de regionoj?

Granda ĝojo estas por ni ricevi unuajn respondojn el Afriko! Pasis preskaŭ duono de jaro, kiam mi skribis al Hans Bakker, respondeculo pri Afrika Agado ĉe UEA, petante helpon interkonatiĝi kun samideanoj el la kontinento. Respondo estis tiel rapida, ke komence mi ne kredis al miaj okuloj! Mi ricevis grandan adresaron kun multe da diversaj informoj pri la temo. Post prezentado de la sendaĵo en la klubo ni ĉiuj konkorde decidis doni manon al niaj nigraj amikoj! Ĉar ofte letero estas por ili ununura rimedo praktiki esperanton kaj kontaktiĝi kun la movado esperantista; ĉar plej ofte ili estas malriĉaj kaj ne eblas al ili vojaĝi; ĉar malmulte da esperantistoj deziras korespondi kun ili, kvankam ili estas certe ege interesaj kiel homoj kaj kiel esperantistoj!

Iam mi decidis lerni esperanton cele ekkoni la mondon, diversajn kulturojn kaj reprezentantojn de ili. Mi lernis mem, kaj el diversaj libroj voĉo de Ludoviko Zamenhof instruis min, ke ne ekzistas bariero de nacio, politiko, haŭtkoloro aŭ religio. El malantaŭ paĝoj li paroladis dirante pri amikeco kaj unueco de nia civilizacio. Ĉu li eraris? Mi pensas, ke nia Majstro ne antaŭvidis problemon de ekonomio kaj generacion, kiu deziras korespondi NUR kun britoj, germanoj - el okcidenta parto, kompreneble - aŭ usonanoj. Kial mi neniam vidis peton: mi deziras korespondi NUR kun rumanoj, poloj, afrikanoj aŭ orientaj germanoj - ĉu hodiaŭ beleco de amikeco dependas de regiono?

Eble ĉiuj esperantistoj jam konas Afrikon, aŭ ekonomie malriĉaj landoj tute ne valoras'je spirito kaj kulturo?

Tial denove mi proponas: havu kunligon skribante al niaj samideanoj el Afriko!

En "Varsovia Vento" ni prezentas kaj prezentos adresojn de tieaj esperantistoj, kiuj jam respondis al nia propono korespondi. Skribu al ili kaj ankaŭ vi konvinkiĝos, kiel bele estas ricevi leteron el tiel malproksima, ekzotika kaj bela mondparto! Jen la komencaj adresoj:

S-ro Evaristus Attach, P.O. Box 234 Nsukka, Enugu State, NIĜERIO (35-jara instruisto, pri sporto, lingvostudado, edukado, internaciaj aferoj).

S-ro Issac K. Quartey, P.O. Box 199 Land Valution Board, Akim-Oda E/R, GANAO (27-jara oficisto; pri vojaĝoj kaj kantoj, interŝanĝas bildkartojn)

*Ireneusz Bobrzak*
*El Varsovia Vento, aŭg/1992.*

Rim: Por kontakti Hans Bakker skribu al la adreso de UEA: NL-3015 BJ Rotterdam, Nieuwe Binnenweg 176, Nederlando.

# Alvoko!

Projekto. Alvoko al instruistoj!

## *INTERNACIA KONKURSO PRI MODELA E-PAROLO*

## memore al Ivo Lapenna

Por etendi al esperanto tradicion ekzistantan el pluraj landoj, ni lanĉas internacian konkurson. En 1993. la konkurso okazos por mezlernejanoj.

***De jaro al jaro alternos la konkurso laŭ celgrupoj: infanoj, junuloj, plenaĝuloj.***

La konkurso volas turni atenton al bela, modela, por ĉiu klara kaj komprenebla parolo en esperanto. La plej bonaj estos distingitaj per honoraj diplomoj de IVO LAPENNA (poste eble medaloj).

Ĉiu aliĝinto prezentos libere elektitan prozan tekston, ne pli longan ol 20 tajpitaj linioj. La instruisto ĵurios siajn lernantojn aliĝintajn kaj sendos la plej talentajn (ne pli ol 3 personoj) al landa konkurso, kie la konkursantoj prezentos siajn tekstojn kaj tuj poste, sen antaŭa sinpreparo nekonatan tekston ricevitan samloke. Pri ilia vicordo decidos trimembra ĵurio.

La voĉoj de la kvin unuaj konkursantoj estos registritaj kaj la registraĵo estos plu ĵuriata de almenaŭ kvin kompetentaj personoj, apartenantaj al kvin diversaj naciaj lingvoj. Ĉiu el ili poentos ĉiujn registraĵojn ne konante la priĵuĝajn notojn (de 1 ĝis 10) de la ceteraj ĵurianoj.

**Ĉe prijuĝado estos konsiderataj:**

1) Klara kaj regula prononco de ĉiuj sonoj;
2) ĝustaj akcentado kaj intonado;
3) ritmo kaj laŭsenca disigo de penselementoj.



Aliĝo ĉe propra instruisto ĝis la 31a de januaro 1993.

Loka konkurso: en la dua semajno de februaro 1993.

Landa konkurso fine de marto.

Internacia ĵuriado: aprilo.

Prezento de la distingitoj ĝis la 15a de majo 1993.

Ĉiuj instruistoj kies lernantoj deziras partopreni en la konkurso Ivo Lapenna informu la ĉeforganizanton s-ro G. Kurucz ĝis la 5a de Februaro 1993. Adreso:

*Gimnazio Júlia Bányai, Géza Kurucz, Nyíri út 11. 6000 Kecskemét, Hungario.*

EVENTOJ, eszperantó nyelvű információs lap.
Nyt. sz.: B/TSZL/85/1991. ISSN 01215-959 X.
A kiadó és a szerkesztőség címe:
H-1675 Budapest, pf. 87. Tel.: 1288258.
Megjelenik kéthetente. Kézbesíti a HELIR.
Készült az M & M nyomdában:
H-1161 Budapest, Bercsényi u. 10.
*EVENTOJ*, dusemajna gazeto pri la esperanto-movado.
Eldonas Kultura Esperanto-Asocio
kaj LINGVO-Studio, Budapest.
Respondeca eldonanto kaj ĉefredaktoro László Szilvási.
La redakcio ne nepre konsentas pri la enhavo de unuopaj artikoloj, kaj ne respondecas pri la anonc-enhavoj.




Interesis min la rubriko *"Interese"* en la n-ro 13. de EVENTOJ. Dankon pro via redaktora rimarko. Bone reagas la redakcio de EVENTOJ. Tamen ankaŭ LKK (La Kancerkliniko) estas insultita. Miaflanke, mi volus unue danki al Nov-Zelanda Esperantisto, kiu reklamas (senpage) La Kancerklinikon kaj la *Leteron el Palestino*. Due mi rimarkas, ke la stalinismaj argumentoj plu validas: pornografio rimas kun malamikoj. Trie, kiel kutime, kontraŭcionismo egalas antisemitismon - nur Aldo de'Giorgi rebatis, en LKK, tiun *Leteron* per argumentoj kaj ne per insultoj. Kvare, Lagrange neniam komparis la verkon de Piĉ kun la poemoj de Kalocsay! Kvine kaj laste ne ĉiuj gazetoj bezonas "ŝtopi spacon", kiel sendube okazas al Nov-Zelanda Esperantisto

*Ĵak Le Puil, Francio*

En EVENTOJ n-ro 13 aperis eltiraĵo de Nov-Zelanda Esperantisto, en kiu la verkinto nomas la hispanan literaturiston (cetere tre talenta) Georgo Kamaĉo *"ekstrema antisemito"*. Reage, la red. de EVENTOJ rimarkas tie, ke estus malfacile akcepti la difinon ke Kamaĉo estas *"ekstrema antisemito"*.

Permesu al mi do interveni kaj deklari, ke (bedaŭrinde) la unua el ili pravas! Georgo Kamaĉo jam aperigis en kelkaj e-gazetoj tre akrajn kontraŭisraelajn artikolojn kaj tradukaĵojn konsistantaj el mensogoj, fiakuzoj kaj falsigo de la veraj faktoj. Li prezentis ĉiam malobjektive nur la opiniojn de la araba flanko rilate la israelan-araban konflikton, kvazaŭ ne ekzistus ankaŭ alia flanko.

La sola konkludo mia estas, ke s-ro Kamaĉo sentas fortan malamon al Israelo kaj la judismo, ĉar alie li ne povus akuzi la judan ŝtaton pri krimofarado kontraŭ la palestinoj. Alie li eble nur kritikus la politikon de Israelo, sed ne proklamus, ke *"Israelo murdas kun aŭ sen milito"*.

Ĉiu, kiu konas bone la faktojn, scias kiu murdas kiun en Israelo.

*Josef Ŝemer, Israelo*

*Reago al la insultoj en "Kamaĉo: ĉu literatura snobo?" en la numero septembro (1), '92, p.8, kun danko pro la redakteja rimarko.*

### AL NEKONATA MALAMIKO

El revuo nov-zelanda,
danke al Eventoj,
nekonato min atingis
preter kontinentoj.

Li ne skribis ekskluzive
nur por min insulti,
sed laŭeble por min lezi,
murdi kaj sepulti.

Li, cetere, min atakas
ankaŭ lingvo-teme,
ĉar mi uzas esperanton
fie kaj blasfeme.

Li profitas, ke Eventoj
estas sencenzura,
kaj cenzure min kromnomas
snob' literatura;

ĉio, kion mi finverkis
estas kalumnia
aŭ mensoga aŭ diabla
aŭ pornografia.

Certe lin ĉagrenas forte,
ege kaj penetre,
ke Karolon Piĉ mi ŝatas
teme kaj beletre.

Sub la cindroj vezuviaj
kuŝas nun Pompejo;
same multajn misromanojn
kovras *La Tombejo*.

Mi ĝin amas kaj adoras
kaj pri ĝi prelegis.
Male, li ĝin anatemas,
tamen ĝin ne legis.

Se, almenaŭ, li legintus
de komenc' ĝis fino
la *Leteron*, kiu temas,
nu, pri Palestino...

Li preferas grunti plue,
eble pro kokluŝo,
kaj gurdadi onidirojn
jam el tria buŝo.

Sed ni iru al la kerno,
la aferon diru:
simple mi malcionismas.
Kial oni miru?

Jes, la ŝtato israela
vivas jam reale,
sed mi rajtas ĝin kritiki
ankaŭ radikale.

Ĝi ekzistas kaj ekzistu,
sed ĝi kritikeblas,
ĉar opresas ĝi popolon,
kiu febre feblas.

Pri palestinanoj temas.
Iu eĉ konjektis,
ke por vivo en turmentoj
ilin di' elektis.

Milionojn da hebreoj
murdis la nazioj.
Tamen, ĉu hitleraj krimoj
estu alibioj?

Ankaŭ Israelo murdas
kun aŭ sen milito.
Ĉu dirante tion estas
mi - antisemito?

La islam-arabaj landoj
plenas je despotoj.
Ĉu pro tio Israelo
plenu je zelotoj?

En Irano kaj Irako
regas totalismo.
Ĉu pro tio Tel-Avivo
regu per faŝismo?

Nu, sincere mi preferas
resti nura snobo,
ol la krimojn israelajn
vidi kun aprobo.

Mi salutas adiaŭe
(eĉ al Nov-Zelando)
kaj la nekonaton dankas
pro la propagando.

Se elekti, mi nur estu
kavalir' laŭmoda,
ne staline nefleksebla
bruto antipoda.

Do, por fini, mi deklaras
pere de Eventoj,
ke, verdire, min honoras
liaj komplimentoj,

ĉar li min atakis fuŝe,
mise kaj senscie,
blinde, malsamideane
kaj inkvizicie.

*Georgo Kamaĉo*

*(Pro manko de spaco ni povas aperigi nur fragmentojn. La red.)*

## Helpo-peto de I.A.H.E.!

La milito inter Serbio kaj Kroatio preskaŭ plene detruis la havaĵojn de la Internacia Asocio de Handikapitaj Esperantistoj, IAHE (la mono en la banko estis konfiskita, poste la bankoj bruligitaj, la arkivo, biblioteko, varbmaterialoj ne plu uzeblaj...

Kiuj volas montri humanecon, solidarecon kaj helpopretecon, tiuj estas petataj sendi mondonacojn al:

*Internacia Asocio de Handikapitaj Esperantistoj, Skolska u. 25, HRV-56227 Borovo, Kroatio.*

*laŭ "La Ondo de Esperanto, n° 3/92.*

## *ĈU ANKAŬ VI KONTRIBUAS?*

Laŭ la iniciato de Renato Corsetti estis establita la Fondaĵo Espero (= "Ne al glavo..." vidu la artikolon *Esperantista solidareco* en aŭgusto (2)-92 de EVENTOJ). Por helpi la milit-suferantajn individuajn esperantistojn ĝis nun kolektiĝis jam pli ol 18.000 guldenoj!

La unuaj kontribuantoj al la UEA-konto "espero" estis H. Bakker. R. Corsetti, I. Ertl, I.&J. Jackson, E. Kehlet, U. Lins, G. Maertens, S. Milojevic, H. Tonkin, P. Weide, J. Wells kaj L.C. Zaleski-Zamenhof.

En la oktobra kunveno la estraro de UEA decidis baldaŭ establi kuratorion de la fondaĵo. Kontribuo de esperantistoj estas daŭre bonvena.

# Anoncetoj

Kiu deziras gajni 15.000 guldenojn ĉe la firmao INTERKULTURO? - Fariĝu "Esencil-varbanto" ! Por pli da informoj skribu al:

*INTERKULTURO, Kočevarjeva 12, SL-62000 Maribor, Slovenio.*

* * * * *

La Aŭstria Esperanto-Junularo kunvenas ĉiun duan lundon en la monato en la Esperanto-ejo 1180 Wien, Paulinengasse 13, Stiege 3, Rufanlage.

* * * * *

"Movado Sen Nomo" havas novan adreson! Ekde nun la korespondaĵojn'bv. direkti al:

*Movado Sen Nomo, Frankrijklei 140, B-2000 Antwerpen, Belgio.*

* * * * *

Kiu jam eksciis ion pri la kristanaj saĝecoj de la Rozkrucanoj? Skribu al mi viajn pensojn kaj opiniojn.

*Anton Schaffer, Weiskirchner str. 25, A-8740 Zeltweg, Aŭstrio.*

* * * * *

Mi vendas stokon da malnovaj e-libroj. Petu prezoliston.

*Hilary Chapman, 8 Vardre View, Deganwy, CONWY, GWYNEDD, LL31 9TE, Britio.*

* * * * *

*Amik' en Afrik'*

25 kursfinintoj fondis e-grupon en Kinŝasa, Zairo, kiuj nun petas vian helpon. Estus ĝoje akceptataj lernolibroj, vortaroj, kaj ĉefe regulaj esperanto-gazetoj. Post legado, se vi ne plu bezonas ĝin, plusendu ilin al la grupo

*"Verda Spegulo", BP 108, Kinshasa, Zairo.*

* * * * *

En Haitio esperanto-instruisto starigis etan Esperanto-Bibliotekon kaj akceptus librojn kaj gazetojn por ĝi.

*S-ro Adrien Luzincourt, 34 rue Joseph Janvier, Port-aa-Prince, Haiti.*

* * * * *

Lingvoinstruado (rusa, esperanta, angla ktp), konstruado (domo, oficejo), presado (libroj, gazetoj, informiloj, ktp):

*Ruslanda Esperanto-Asocio, Pk. 162, Jekaterinburg-14, RUS-620014 Rusio.*

* * * * *

La Esperanto-Centro de SEA en Poprad (Ĉeĥoslovakio) troviĝas meze de naciaj naturparkoj Altaj kaj malaltaj Tatroj, Slovakia Paradizo. La centro posedas plurajn domajn (inkluzive gastejon por esperantistoj!), organizas multajn E-aranĝojn, kursojn, konferencojn, havas propran libroservon kaj eldonan agadon. La multbranĉan agadon de la centro gvidas inĝ. Milan Zvara.

Antaŭnelonge aperis kvarpaĝa sinprezenta broŝuro, kion ankaŭ vi povas peti senpage ĉe:

*Esperanto-Centro, Sobotské nám. 6, CS-058 01 Poprad. Tel.: +42-92-32419*

# Interese...

## Kio ĝi estas manaĝisto?

La vortoj *"manaĝisto"* (manager) kaj *"manaĝado"* (managment) estis uzataj en la angla lingvo ankoraŭ en la pasinta jarcento. Sed nur en dua kvarono de la 20-a jarcento ili iomete komencas ekhavi certan sencon, kiu donas la klarigon, ke manaĝisto estas persono, kiu celkonscie laŭ merkataj leĝoj organizas, aranĝas ian konkretan laboron, uzante nuntempajn rimedojn kaj metodojn.

Manaĝisto ne aŭtomate estas gvidanto aŭ eniras en konsiston de oficej-gvidantaro, sed laŭ usonaj komprenoj, li estas homo, en kies taskon eniras organizado de konkreta laboro, plenumata de certa kvanto da subiĝantaj al li kunlaborantoj.

Por ke estu plena sukceso de entreprenado (organizado), manaĝisto devas havi minimume jenajn personajn trajtojn:

- agemo,
- aktivemo,
- ĝusteco dum la agado,
- certa sinsekvenco de la organizado,
- kunordigo de planoj kaj ties realigoj,
- insistemo,
- konjunktura kalkulemo,
- respondeco.

En okcidenta entreprenado ĉiuj manaĝistoj estas konvencie dividataj je sekvaj gradoj:

- Top-manaĝisto, ano de supera tavolo de gvidado (ĝenerala direktoro kaj aliaj membroj de la direktoraro).
- Meza manaĝisto, ano de meza tavolo de la gvidado (estroj de oficejoj, memstaraj fakoj).
- Malsupera manaĝisto, ano de malsupra gvidtavolo (gvidantoj de subfakoj kaj similaj al ili eroj de oficejoj).

Gvidantoj de aliaj niveloj (en armeo, registaraj strukturoj, preĝejoj k.s.), same dividataj je respondectavoloj nur pro administr-kontrolaj funkcioj, kaj la entreprenado de aferecaj oficejoj diferencas de la ceteraj per tio, ke celoj kaj taskoj de tiu gvidado estas produktado de varoj aŭ prezento de certaj helpoj kaj komplezoj; alivorte kontentigo de sociaj bezonoj *pere de merkato*. Eblas ankaŭ diri, ke manaĝistoj devas aranĝi la gvidadon konforme al ekonomiaj cirkonstancoj. La ĉefa momento en la entreprenado estas sekvi interesojn de sia oficejo (firmao), sed ne interesojn de duagradaj formoj (politiko, strategio, persvado k.a.).

Sekve, manaĝisto estas specialisto, kiu por sia firmao serĉas novajn merkatojn, kaj ne nur pasive reagas al la ŝanĝoj en la merkato, sed per sia organizemo kaj iniciatemo influas al ĝi.

*Jevgenij Datĉenko*
*El "Ukrainia Universitato", jan./92.*

---

Monato

Internacia magazino sendependa pri politiko, ekonomio kaj kulturo. "En esperanto pri ĉio, kio ne rilatas al la movado" - Ĉu vi jam abonas ĝin?

**SENDU ANKAŬ VI INFORMOJN, ARTIKOLOJN PRI VIALANDAJ ESPERANTO-EVENTOJ AL EVENTOJ! Kontribuoj al la "faka aplikado" kaj al iu konkreta rubriko estas aparte bonvenaj!**

---

**Internacia konkurso por lernejanoj**

## 2-a taskfolio por BAZLERNEJANOJ

1. Korektu la erarojn de la frazo: *Lin manĝas varma fissupo kun kuleron.* (3 poentoj)
2. Konstruu kvar ĝustajn demandojn aldonante po unu vorto: ... *vi skribas?* (2 poentoj)
3. Finu la ĉi-subajn frazojn: (2 poentoj)
   En *Giganto-lando* troviĝas homegoj, domegoj, montegoj, urbegoj.
   En *Nano-lando* troviĝas...
4. Difinu ĉiun per unu vorto: (3 poentoj)
   *sinjorino, kiu kuiras en restoracio;*
   *multaj kuleroj, forkoj, tranĉiloj;*
   *per ĝi oni disigas paperon, mallongigas hararon*
5. Kompletigu la frazojn! Estu ĝentila! (2 poentoj)
   *- Bonan vesperon, sinjoro Kukk! ... sidiĝi! Ĉu vi ... ion trinki?*
6. Pri kiuj bestoj temas? (3 poentoj)
   *Ĝi estas malgranda, griza kun longa vosto.*
   *Ĝi estas malrapidega, havas grizan kapon kaj verde brunan "domon".*
   *Ĝi havas nigrajn kaj blankajn striojn.*
7. Nomu la poeton kaj la titolon! (2 poentoj)
   *Jen Kaspar' kun sia preĝ': / tiaspeca tera reĝ'.*
8. En kiuj jaroj Budapeŝto okazigis *UK-n de esperanto?* (3 poentoj)

***Oni povas iam ajn aliĝi al la konkurso. Regularon vidu en la numero aŭgusto (1)-92!***

*La solvojn sendu ĝis la 23a de novembro al: Általános Iskola, Esperanto-grupo Hunyadi u.2. H-8798 Zalabér, Hungario*

